

ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2022





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 29[3] numero 147 septembro 2022

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de novembro 2022

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2022 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILO: Ĵenja Amis antaŭ Sinagogo Beith Shlomo, dum la ekskurso *Montrealo Juda*. (Vidu paĝon 5.) Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 26.



ENHAVO

Antaŭparolo	04
UK en Montrealo – raporto 1	05
UK en Montrealo – raporto 2	10
Vizito al la fino de la mondo	11
Kiel esperantumi en la Norda Teritorio	14
Mikspoto de koloroj	17
Ĉu tamen estas espero?	20
Aŭstralio/Nov-Zelanda Kongreso 2023	21
Magelano	22
Informo pri AEA kaj NZEA	27

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

La jaro ekas al finaĵo kaj la kongreso/kursaro de AEA kaj NZEA en Januaro alproksimiĝas, ĉifoje en Melburno kun elstaraj instruistoj. Do nepre ne maltrafu ĝin. Finfine estos ŝanco renkonti vizaĝ-al-vizaĝe kaj sperti la amikan etoson de Esperantujo.

Alvenis al ĉi tiu eldono artikolo de J Marc Schmidt pri liaj travivaĵoj en Norda Teritorio. Samtempe kiam ĝi alvenis, mia edzino vizitis la filinon en Norda Teritorio, kaj la plej proksima urbeto al ŝi estas Timber Creek, kie Marc loĝis dum pli ol jaro. Rimarkinda koincido. Inter la fotoj de mia edzino estas unu de krokodilo en Timber Creek.

Timber Creek estas trairejo por vojaĝantoj kaj malgranda urbo. Praavoj de mia edzino trairis la lokon antaŭ 140

jaroj antaŭpelante gebovojn okcidenten al novaj paŝtejoj sen pripensoj pri la posedrajtoj de la tiamaj loĝantoj. Estas nur nun, post ducent jaroj, ke ni libere diskutas la efikon de tiaj invadoj kontraŭ la praloĝantoj de ĉi tiu lando. Verkante mian artikolon pri Magelano, mi konsciiĝis, ke estas nur antaŭ 500 jaroj, ke komenciĝis dissemo de la kulturoj el Eŭropo al forforaj landoj tra la mondo.

Kaj estas antaŭ 250 jaroj ke komenciĝis la alveno al Aŭstralio. En 1901 estis la formiĝo de landa registaro. En la aŭstralia konstitucio ne estas mencio de la indiĝenaj loĝantoj. Nov-Zelando havas traktaton frue en sia historio kun la maoria popolo. Baldaŭ en Aŭstralio oni finfine havos referendumon por decidi ĉu estu indiĝena voĉo en la parlamento. Ĉu jes aŭ ne?



107-a Universala Kongreso en Montrealo: mia sperto

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Ĉar miaj du filinoj loĝas en Kanado, mi decidis partopreni la (prokrastitan) UK-on en Montrealo. Mi kaj mia edzino planis viziton dum 11 semajnoj, kaj mi faris unu-semajnan flank-vojaĝon por la kongreso.

Mi komencis mian vojaĝon al Montrealo sabaton je 05:00, kiam mia filino ŝoforis min al la flughaveno de Valo Comox, Brita Kolumbio. Tamen, post kiam ni alteriĝis ĉe Montrealo iom post 17:00, io stranga okazis: ni devis atendi niajn valizojn dum proksimume horo kaj duono! (Estis neniu ekspliko de Air Canada.) Pro tio, mi alvenis al la kongresejo kiam la Movada Foiro ĵus finiĝis. Bedaŭrindas, ĉar mi planis prizorgi la tablon por Aŭstralio, kaj disdoni broŝurojn pri la kongreso en Melburno en januaro.

Feliĉe, mia kongresa sperto pliboniĝis post tiam. Mi ĉeestis multajn fascinajn prelegojn pri diversaj temoj, kaj partoprenis amuzajn paroligajn lecionojn, kiujn gvidis Sylvain Lelarge (iufoge konita kiel la edzo de Katalin Kováts).

Estis plezuro re-renkonti kelkajn amikojn, kaj renkonti ĉeeste unuafoje Alexander Vaughn Miller, kiu lerte gvidis la kurson por progresantoj dum la ĉi-jara aŭstralia kaj nov-zelanda virtuala kongreso. Mi kaj la afabla David Ryan de Nov-Zelando estis la solaj kongresanoj el Oceanio.

Merkredo estis "libera tago" (krom se oni partoprenis tuttagan ekskurson). Mi decidis viziti la mirindan Muzeon de Belartoj. Kvankam tio ne estis parto de



La akceptejo kaj kongresa butikoj



La solena inaŭguro: Vic-prezidanto de UEA, Fernando Maja, parolas.

la kongreso, mi surhavis Esperantan T-ĉemizon, do mi ankoraŭ iom subtenis la movadon!

Ĵaŭdon, mi prezentis mian prelegon, *La arto de desegnado*, kiu ŝajnis iri bone. Mi estis tre honorita, ke unu el la spektantoj estis Sonja Lang, la kreinto de *toki pona* (Tokipono), la lingvo inspirita de zeno, kun nur 134 oficialaj vortoj. Ŝi komplimentis

min poste pri mia prelego. Vendredon, mi ĉeestis la ŝian, pri Tokipono. Tio estis tre populara kaj bona programero: la ĉambro apenaŭ estis sufiĉe granda por ĉiuj. Estas interese sed ne surprize vidi, ke Esperanto kaj alia konstruita lingvo povas vivi apude kaj amike, ĉar ili havas malsamajn celojn.

La plej elstaraj programeroj por mi estis duparta koncerto mardovespere, kaj



Sylvain Lelarge (en la ĉapelo) gvidas ekzercon pri falsaj vort-amikoj.



Amri Wandel prelegas pri spacteleskopoj.

teatraĵo ĵaŭdovespere. Dum la koncerto, Joëlle Rabu kantis unue, akompanita de sia filo, Nico Rhodes, lertege ludanta pianon, kaj en la dua duono, Yves Desrosiers kaj kvin aliaj muzikistoj ludis muzikon, ĉefe instrumentan, komponitan de Yves. Ĉio estis tiel altnivela kaj inspiranta. La teatraĵo, *1910*, baziĝis sur la sperto de brito, William Mann, kiu akompanis Zamenhof al la 3-a Universala

Kongreso en Vaŝingtono, Usono, kaj poste al Montrealo, Kanado, kie loĝis parencoj de la majstro. Ĝi estis, esence, unuhoma teatraĵo, dum kiu "William Mann" rememoris siajn spertojn; tamen pluraj anoj de la spektantaro faris diversajn (verkitajn) demandojn, kiujn la aktoro respondis, kaj je la fino, "S-ino Mann" mallonge aperis. La teatraĵon verkis Ĵanja Amis, la sekretario de la LKK.



Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes koncertas.



Yves Desrosiers kaj muzikistaro

La sekvan matenon, Ĵenja gvidis tre interesan ekskurson, *Montrealo Juda*, kaj posttagmeze, prezentis pli da informo pri William Mann kaj la 3-a UK dum sia prelego, *Malantaŭ 1910*.

La kongresejo estis ĉefe en moderna konstruaĵo de la Universitato de Kebekio en Montrealo (UQĀM), tamen grandaj programeroj okazis en bela, historia teatro, *Cinéma Impérial*, provizore nomita "Salono Zamenhof". Mi tranoktis ĉe la

studenta loĝejo UQĀM ne for de la ĉefa kongresejo. Ĝi estis sufiĉe komforta, sed ŝajnis, ke iu forgesis balai la plankon antaŭ ol mi alvenis.

Ĉu mi feliĉas, ke mi iris? Sendube. Mi ĝojis esti parto de la unua ĉeesta UK post la komenco de la pandemio (kaj ĝojis, ke mi mem ne infektiĝis). La LKK indas gratulon pro bonega kongreso, organizita por 2020, nuligita, kaj finfine revivigita kaj reorganizita por 2022.



Jonathan prelegas pri desegnado.



Sonja Lang parolas pri Tokipono.



Teatraĵo 1910. Aktoro: Garry Evans



Ĵenja Amis prelegas pri la fono de la teatraĵo 1910.

Raporto pri la Universala Kongreso

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

Mi bonŝance ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en bela Montrealo en Aŭgusto 2022. Ĉeestis pli ol 800 kongresanoj, plejparte el Kanado kaj Usono, sed ankaŭ el multaj aliaj landoj. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo de la loka universitato (sed ne ĉeestis studentoj pro la tiama somera ferio en Kanado).

Ĉi-kongrese ne ĉeestis tiom da kongresanoj, eble pro daŭra timo pri la viruso aŭ la fakto ke la kongreso okazis ekster Eŭropo. Ĝojigis min la ĉeesto de esperantistoj de diversaj aĝoj, kaj estis multaj junuloj.

La kongresa programo estis plenplena. Ĉiutage okazis multaj prelegoj pri diversaj aferoj: la historio kaj lingva situacio en Kanado, indiĝenaj lingvoj, instruado de Esperanto, filmoj kaj muziko, arto, Tokipono, famaj esperantistaj verkistoj, ktp. Por mi, la plej interesan prelegon prezentis Esperantisto el Ukrainio pri la tiea milito.

La lingva nivelo de ĉiuj kongresanoj kaj prelegantoj estis alta, kaj mi bone komprenis ĉion.

Post la kongreso mi restis kelkajn tagojn en Montrealo por ĉeesti kurson de la franca lingvo.



Katedralo de Montrealo

Vizito al la fino de la mondo

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

Kanado estas lando kiu ege plaĉas al mi kaj mi jam vizitis plurfoje, sed mi ne konis la tiel nomitajn “marprovincojn” oriente de Kebekio. Pro tio, post la Universala Kongreso en Montrealo en Aŭgusto 2022, mi pasigis semajnfino en St John’s (Sankta Johano), ĉefurbo de la provinco de Novlando kaj Labradoro. Konfuzo, St John estas nomo de la dua plej granda urbo en la apuda provinco de Nov-Brunsviko. Kiom da pasaĝeroj enaviadiliĝas por erara urbo, kaj – plej grave – kiel distingi “St John’s” kaj “St John” en Esperanto? (Ĉu “Sankta Johano” kaj “Sankt-Johano”? – Red.)

Kun loĝantaro de malpli ol 200 000 homoj en la ĉefurba regiono, Sankta

Johano estas malgranda urbo kiu, laŭ mi, multe similas al irlanda urbeto kiel, ekzemple, Galway. Fakte, la parolmaniero de lokaj homoj similas al la irlanda kaj ŝajnas ke aliaj kanadanoj mokas ilin pro tio. Tamen, mi trovis, ke enloĝantoj de Sankta Johano estas tre ĝentilaj al vizitantoj.


Sankta Johano estas unu el la plej malnovaj urboj en Nord-Ameriko, kun la haveno “malkovrita” je la fino de la 15-a jarcento. Ŝajnas, ke portugaliaj fiŝkaptistoj fondis malgrandan vilaĝon tie en la 16-a jarcento, sed poste venis esploristoj kaj marsoldatoj de diversaj eŭropaj landoj, kiuj rekonis la strategian lokon de Sankta Johano. La urbo havas faman kvartalon



Ĉefstrato de Sankta Johano

kun multkoloraj domoj. Pro granda fajro en la 19-a jarcento, multaj domoj detruigis kaj, kiam oni volis rekonstrui ilin, mankis multaj materialoj, sed ne farbo por ŝipoj! Pro tio, ĉiuj domoj en tiu kvartalo havas malsamajn kolorojn. La urbo ankaŭ havas grandan romkatolikan katedralon sur monteto apud la urbcentro, kiun oni povas vidi ekde tre for.

Apud Sankta Johano troviĝas vere la fino de la mondo, aŭ alivorte la punkto plej orienta de Nord-Ameriko, ĉe Cape Spear (Kabo Spear) je 12 kilometroj de Sankta Johano. Tie nun estas lumturo kaj turisma loko. Eblas viziti ĝin aŭtomobile. Mi iris en boatekskurso kaj survoje vidis balenon!



Romkatolika katedralo



Supre: Multkoloraj domoj

Meze: Kabo Spear, fino de la mondo je la plej orienta punkto de Nord-Ameriko

Malsupre: Vido de la haveno kaj urbo



Kiel esperantumi preskaŭ sole en la Norda Teritorio (kun Mitsubishi Delica)

J MARC SCHMIDT (COOMA, NSK)

En Novembro 2013, mia edzino kaj mi komencis loĝi en la Norda Teritorio. La unua loko estis en Arnhemlando, en la vilaĝo de Ramingining, sep horojn oriente de Darvino per Toyota Landcruiser. Mi instruis en la elementa lernejo tie dum kvin semajnoj. La laboro estis tre interesa kaj bona.

Ĉu vi memoras la aborigenan desegnaĵon sur la aŭstralia \$1 monbileto? La artisto devenis de Ramingining. Ja bona vendejo de arto estas en Ramingining. Mi memoras la ĉiutagan pluvegon, kvazaŭ laŭhorloĝe post la fino de lecionoj en la lernejo. La infanoj estis amikemaj kaj ludemaj. La arbaro estis densa, kaj la

tero estis ruĝa. Post la kvin semajnoj, mia edzino kaj mi revenis al Darvino aviadile. Nokte, fulmo dancis sur la Arafura Maro. Ni aĉetis malnovan, brunan Mitsubishi Delica de du francaj dorsosakuloj, kaj veturis al Sidnejo por festi Kristnaskon kun miaj gepatroj kaj fratoj.

Antaŭ la tempo en Ramingining, mia edzino kaj mi loĝis en Japanujo, en la urbo Yawata. Tie mi esperantiĝis. Mi aliĝis al proksima klubo, la Esperanto-Societo en Hirakata, kaj ofte partoprenis en kongresoj. Mi esperantumis iomete en Sidnejo kaj Gosford dum pluraj monatoj, dum mi atendis vizon por mia edzino, kaj instruo-permeson por mi. Kiam ŝi ricevis



Sunsubiro ĉe Ubirr, Nacia Parko Kakadu, 2014



Faligita arbo post ciklono Marcus, Marton 2018

la vizon, mi reiris al Japanujo por renkonti ŝin. Tie, mi partoprenis en la 100-a japana Esperanto-kongreso kaj poste tranoktis kun aliaj esperantistoj ĉe la Esperanto-domo en Yatsugatake. Poste, mia edzino kaj mi revenis al Aŭstralio, kaj baldaŭ post tiam ni sidis en infano-plena Toyota Landcruiser de Poinciana Inn en Darvino, survoje al Ramingining.

En 2014 ni revenis al la Norda Teritorio. Mi laboris dum du semajnoj en la lernejo en Borrooloola, tre humida loko sur la okcidenta marbordo de la Golfo de Karpentario. Poste venis ĝisjarfina laboro en lernejo en Gunbalanya, proksime al Nacia Parko Kakadu. La Mitsubishi Delica transportis nin tien, kaj en 2015 al Timber Creek, kie ni loĝis ĝis la fino de 2016. Tiu estas vilaĝeto apud Rivero Victoria, ĉ. 300 kilometrojn okcidente de la urbo Katherine. Post tio, kaj fine, ni loĝis en la urbo Palmerston apud Darvino, kien ni translokiĝis pro la nasko de nia unua filo.

Dum nia tempo en la Norda Teritorio,

mi ĉesis esperantumi laŭ la antaŭa maniero. Tamen mi ja esperantumis iomete. Ekzemple

- Mi konversaciis per Skype kun la Esperanto-Societo en Hirakata ĉiusemajne dum 2014. (Tamen, renkontiĝo vizaĝo-al-vizaĝa estas pli bona ol reta renkontiĝo.)
- Mi planis prezenton pri Esperanto en la biblioteko de Kununurra, la plejproksima "granda urbo" apud Timber Creek. (Neniu alvenis!)
- Per la apo Amikumu, mi babilis kun Esperantisto sur krozoŝipo en la Maro Arafura.
- Mi pretigis senkostan kurson por la komunuma vespera lernejo en Altlernejo Casuarina en Darvino (Neniu alvenis... ankoraŭfoje!)
- Tamen pro tio, mi ekkonis la (ŝajne) unusolan esperantiston en Darvino krom mi: S-ro Raymond Taylor, kiu eklernis Esperanton en Nov-Zelando dum la 1950-aj jaroj.

- Mi kunsidis kaj vespermanĝis kun Esperanto-societo en Hirakata dum vojaĝoj en Japanujo en 2016 kaj 2017.
- Mi kafumis ĉe kafejo *De La Plage* kun Sandor Horvath kiam li vizitis Darvinon.
- Mi partoprenis la AEA-kongreson en Kanbero en 2013 (ni veturis tien per la Delica), la trilandan kongreson en Bekasi en 2018, kaj la virtualan AEA-kongreson en 2021.
- Mi verkis iujn artikolojn por tiu ĉi gazeto.

La Mitsubishi Delica estis bona por ni. Ni ofte veturis al Darvino de Gunbalanya dum 2014. Ĝi transiris la Riveron East Alligator inter Arnhemlando kaj Kakadu kiam la profundeco de tiu rivero estis 70 cm. (Tre timinde – en tiu rivero konstante abundas homomanĝemaj krokodiloj). Dum 2015 ni ofte veturis de Timber Creek al urboj Kununurra, Katherine kaj Darvino. En Aprilo 2016 ni veturis per la Delica de Timber Creek al Broome kaj reen. Bedaŭrinde, iam post tiu vojaĝo, la stato de la motoro malboniĝis. La kosto por rebonigi ĝin estis tro granda, do anstataŭe, ni vendis la aŭton malmultekoste. Post la

morto de la motoro, la Delica komencis sian novan vivon kiel dormejo kaj ŝirmejo. Eble ĝi ankoraŭ funkcias tiamaniere!

Nu, ni translokiĝis el la Norda Teritorio, kaj nun loĝas en urbeto Cooma, en la neĝa montaro de Nova Sud-Kimrujo. Jen esperantistoj kun kiuj esperantumi! Kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn, la sezono estas vintro. Nun la suno ŝajnas esti amiko. Mi tre ŝatas spekti la malfortan matenan sunbrilon en la kuirejo, tra la vaporo de la verŝilo de la tekruĉo. Kontraste, en Palmerston, la suno ofte ŝajnas kiel malamiko! Ĉiu domo havas ombroŝirman ŝtofon. Proarba ombro en parkejo estas tre valora. Klimatizilo funkcias preskaŭ senĉese ĉiuĉambre. Eksterdoma movado estas pli bona antaŭ la 9-a matene, kaj post la 5-a posttagmeze.

Kia estas la somera sunbrilo ĉi tie, en Cooma? Mi aŭdis ke la ultraviola radiado estas pli forta ol tiu en Sidnejo, pro la alteco. Tiam, eble denove la sunbrilo remalamikiĝos. Nu, ĝis nun mi ĝuas la kalvajn montetojn, la senfoliajn arbojn, la frostan matenan aeron, kaj la pacan vivmanieron ĉi tie.



Kun Sandor kaj mia filo ĉe kafejo De La Plage, Julion 2019

Mikspoto de koloroj

KATJA STEELE (ADELAJDO)

La homa okulo povas vidi lumon nur en la videbla spektro kaj ĝia sentivo al lumo dependas de la ondolongo en la spektro. La homoj povas vidi multe pli da koloroj ol ni supozus, inter ili, ekzemple, 100 gradojn de flav-bruna kaj 100 gradojn de ruĝ-verda. Tamen ni memoru, ke ĉiu vidas la kolorojn malsame kaj tiuj koloroj ŝanĝiĝas depende de la lumo. Teknike, do, ekzistas senfina nombro de koloroj.

La ĉielarko havis ĝis la jaro 1704 nur kvin kolorojn. Tiam Isaac Newton aldonis la oranĝan kaj indigon al la listo nur ĉar li ŝatis la supozatajn mistikajn ecojn de la numeralo 7. Fakte, la ĉielarko ne havas purajn kolorojn, ili ĉiuj miksiĝas en unu kontinuan spektron.

Oranĝa. Kio estis pli frua: la nomo aŭ la frukto? La frukto estis la unuan fojon kultivata probable en Ĉinio. *Narang* (persa), *naranj* (araba), *orange* (franca), *naranja* (hispana), *narancs* (hungara), *pomaranĉ* (slovaka) kaj *orange* en la angla. Oranĝa kiel nomo por koloro aperis nur en la 16-a jarcento.

En 1923 Clyde Keeler, usona genetikisto studanta la okulojn de blinda muso, faris malkovron. Neklarigeble, eĉ se al la muso komplete mankis lumsensiloj, kiuj permesas al mamuloj sperti lumon, ĝiaj pupiloj tamen malpligrandiĝis responde al ĝi. Nur post tri kvaronoj de jarcento la ligo estis definitive pruvita: ĉiu, eĉ la blinduloj, havas specialan sensilon, kiu sentas la bluan lumon. Tio estas ŝlosilo, ĉar ĝi estas nia respondo al tiu ĉi peco de spektro, nature ĉeestanta en la taga lumo en la plej alta koncentriĝo. Tio determinas nian diurnan ritmon, la internan horloĝon, kiu helpas nin dormi dum la nokto kaj esti konscia dum la tago. La lumoj de la nuna moderna tempo troŝarĝas nin per la blua lumoj, kio havas negativan influon al nia dormo-kutimoj.

Arĝenta. Ĉu vi iam pensis pri tio, ke la nomo Argentino rilatas al arĝento? Estis la hispanoj, kiuj nomis la landon laŭ ĝi (en la latina "*argentum*" signifas arĝenta). Inter la 16-a kaj 18-a jarcentoj la hispanaj konkerantoj eksportis ĉirkaŭ



150,000 tunojn da tiu ĉi metalo.

Ora. La oro kiel metalo havas strukturon, kiu enhavas moviĝantajn elektronojn forte reflektantajn lumon. Tiu ĉi eco donas al ĝi la specialan brilon.

Konata estas la mito pri reĝo Midas, kiu deziris, ke ĉio, kion li tuŝas, iĝu oro. Nur kiam lia deziro plenumiĝis, li malkovris, ke li mortigas ĉion, kion li tuŝas kaj ke li ne povas manĝi.

La unua konata uzo de la vorto "ora" kiel koloro estis en 1400 kaj 1423 por indiki blondajn harojn.

La ora koloro estas la koloro de riĉeco. Unufanke ĝi elvokas negativajn kvalitojn kiel avaron kaj havemon. aliflanke ĝi estas asociata kun luminiĝo, amo, kuraĝo, magio kaj saĝeco.

Pluraj koloroj ricevis siajn nomojn laŭ floroj. Unu el ili estas koloro nomata **fuksia**. Leonhard Fuchs studis por esti kuracisto en Bavario kaj samtempe komencis esplori plantojn. Li kreis ĝardenon, en kiu li havis kolekton da plantoj el diversaj mondopartoj. En 1542 estis publikigita lia libro pri proksimume 500 plantoj, ilustrita per 512 bildoj. La libro prezentis plantojn el la Nova Mondo, kiujn la eŭropanoj neniam antaŭe vidis. Sed interese, Fuchs neniam vidis la planton, kiu nun portas lian nomon. Ĝi estis konata al eŭropanoj

nur 137 jarojn post lia morto kaj estis trovita sur insulo Hispaniola en la Kariba Maro. La viro, kiu trovis ĝin, botanikisto P. Charles Plumier, nomis ĝin laŭ sia heroo Fuchs.

La inuitoj havas 50 vortojn por diri "**blanka**". Kaj, kvankam la popolo de Himboj en Namibio ne posedas vorton por la blua koloro, ili scipovas facile distingi nuancojn de la verda koloro, kiuj al aliaj popoloj estas ne tiom facile distingeblaj.

Ruĝo. La ruĝan oni ĉiam ligis kun sano, vigla metabolismo.

Tio igas ĝin perfekta akcelilo de apetito kaj la ĉefa koloro por trinkaĵoj. Asociigo kun la ruĝa signifas pliigitan temperaturon kaj sangopremon, kiu gvidas al soifo. La ruĝa kaj la flava kune igas nin malsataj.

Kiu koloro malpliigas la malsaton? La **verda**.

Ŝajnas, ke la ruĝa kiel incitilo por virbovoj estas mito, ke ili tute ne havas kolorpreferon, eĉ ke ili estas kolor-blindaj. Estas la movo de la "*muleta*", la malgranda ĉapelo, kiu provokas ilin. Kaj ili furioziĝas samgrade alfrontitaj ĉu per la fuksin, ĉu per la blua flanko de la *capote*.

La **blua** malpliigas la sangopremon, muskolan reagon kaj la riskemon. Bluj stratlumoj rezultis malpliigon de krimoj en Glasgovo en 2000.





Por la islamanoj la verda iĝis grava en la 12-a jarcento. Ĝi estis la favorata koloro, kune kun la blanka, de la profeto Mahometo. En la Korano la vestoj portataj en la Paradizo kaj la silkaj kuŝlokoj inter la arboj havas la koloron de folioj. En la mezepoka islama poezio Monto Qaf, la Ĉiela Monto, la ĉielo super ĝi, la akvo ĉe ĝiaj piedoj – ĉiuj estas priskribitaj en nuancoj de verdo. Pro tio la verda aperas sur la flagoj de pluraj, grandparte islamaj landoj, kiel Irano, Pakistano, Saud-Arabio kaj Bangladeŝo.

Kiu estas tutmonde la plej ŝatata koloro? La blua. Kiu estas la plej rara koloro en la naturo? La blua.

Ĝi iĝis pli respektata koloro en Eŭropo en la 12-a jarcento danke al la blua robo sur la bildoj pri la Virgulino Maria.

Malhelaj koloroj, speciale la malhela blua, allogas moskitojn. Do bone elektu viajn vestojn, kiam vi la venontan fojon iros tendumi.

Kakia, signifas “polvokovrita” en la urdua. Ĝi iam signifis ŝtofون, uzitan kutime por soldataj vestoj, kiuj estis polvo-koloraj. Oni supozas, ke ĝi estis inventita de kavaliro Harry Lumsden en la nuna Pakistano en 1846. Li volis doni al siaj gvidsoldatoj taŭgan uniformon kaj pro tio aĉetis multajn metrojn de kotona

ŝtofo en bazaro en Lahoro kaj ordonis trempoj kaj tralavi ilin kun koto el la loka rivero, antaŭ ol oni kudris el ĝi malstrikatajn tunikojn kaj pantalonojn. Tio aspektigis la soldatojn, li esperis, nevideblaj en la lando de polvo. Ĉi tio estis io revolucia. La unuan fojon en la historio de armeoj oni uzis uniformojn, kiuj anstataŭ altiri al si la atenton, kunfandiĝis kun la ĉirkaŭaĵo.

La vera **nigra** koloro tute ne reflektas la lumon. Vantanigro (*vantablack*), teĥnologio de karbonaj nanotuboj, kreita en 2014 en Britio, kaptas 99.965% de la spektro. Per tio ĝi estas la plej nigra afero en la mondo. La karbonaj nanotuboj estas 10,000 foje pli maldikaj ol homa haro. La elektromagnetaj ondoj, kiuj frapas tiujn ĉi nanotubojn, iĝas kaptitaj inter ili oscilante tien kaj reen tiel, ke preskaŭ nenio estas reflektita eksteren. Vantanigro estas uzata en satelitoj, komputiloj kaj de armeoj. En 2016 oni produktis 10 brakhorloĝojn kun vantanimagraj numeraloj. Ĉiu kostis 95,000 USD.

Laŭ la studoj jam dusemajna bebo povas distingi la ruĝan koloron. Probable, ĉar la ruĝa havas la plej grandajn ondolongojn el inter la koloroj, kio faras ĝin la plej simpla koloro procezebla de la evoluantaj lumsensiloj kaj nervoj en la okuloj de la bebo.

La verda ĉiam aspektas pli brila por virinoj ol por viroj, kiuj ĉiam vidas nuancon pli flavecan.

Virinoj vidas larĝan spektron de la ruĝ-oranĝa, dum viroj vidas simple la ruĝan. Esploristoj en la Ŝtata Universitato de Arizono en Tempe konstatis, ke estas geno, kiu ebligas vidi la ruĝan koloron, kaj tiu geno havas multajn variaĵojn. La kaŭzo estas geno sidanta sur la kromosomo X, de kiu virinoj havas du, dum viroj nur unu. Virinoj ĝenerale pli bone distingas inter similaj koloroj, dum viroj pli bone rekonas detalojn ĉe moviĝantaj objektoj.

Kromofobio aŭ kromatofobio estas persista, neracia timo de koloroj. Ĝi povas baziĝi sur malnova stresa evento rilatanta al certa koloro. La plej ofta estas eritrofobio, timo de la ruĝa.

Sinestezio estas rara stato, kiam certaj homoj vidas ciferojn, literojn aŭ eĉ tagojn de la semajno kiel kolorojn.

Per kunmikso de tiuj koloroj kaj blanka kreiĝas: **roza** (el ruĝa), **salma** (oranĝa-roza, el skarlata), **malva** (viola-roza, el purpura) kaj **lila** (eĉ pli hela), **lavenda** (el viola), **lazura** (el blua), **limea** (el verda).

Ĉiu el la sekvaj koloroj enhavas brunon: **okra** (brune flava), kakia (verde blua), **oliva** (brune verda) kaj **beja** (ruĝe bruna).

Kelkaj malpli uzataj kolor-nomoj

- **turkisa** (verde blua)
- **glaŭka** (blue verda)
- **indiga** (egale viola-blua)
- **purpura** (ruĝa-viola)
- **skarlata** (oranĝe ruĝa)
- **rufa** (ruĝe oranĝa)
- **sukcena** (oranĝa-flava)
- **kartuzia** (verda-flava)

Fontoj

- *The Secret lives of colour*, de Kassia St Clair
- en.wikipedia.org/wiki
- www.bourncreative.com
- eo.wikipedia.org/wiki
- www.centrecolours.co.uk
- www.ucreative.com
- thevirtualinstructor.com

Ĉu tamen estas espero?

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Kronviruso, minacanta faŝismo, oceanoj poluataj de plastaĵoj, fone nukleaj bomboj, absurdaj diferencoj en enspezoj de landoj kaj individuoj, religia fanatikeco, militoj... aj! kial daŭrigi? Ĉu neniam estas bona novaĵo?

Fakte jes. Ni pli kaj pli konscias pri la problemoj, kaj tio donas iom da espero, ke ni solvos ilin. Ekzemple, nia loka magistrato – oni nomas ĝin urbo Mitcham – ĵus publikigis planojn por reuzi amasegon da

plastaĵoj kaj betono kaj kaŭĉuko (detaloj sube). Krom tio, ĝi faros aliajn paŝojn por plibonigi la biosferon.

Ekzemple: en la antaŭurbo Blackwood oni renovigis la surfacon de du kadukiĝintaj stratoj, kaj la “ingrediencoj” estis:

- 500 kg da recikligitaj plastaĵoj
- 500 kg da recikligitaj kaŭĉukaj pneŭmatikoj
- 200 tunoj da recikligita betono
- 15 tunoj da recikligita rafineja sablo.

Tiu miksaĵo enhavos specialajn aldonaĵojn, kiuj ebligas, ke malpli da karbondioksido eliĝos, kaj la laborkondiĉoj estos pli sekuraj.

Kaj en la antaŭurbo Westbourne Park oni renovigis alian straton: La trotuarrandoj estis faritaj el recikligita betono, la asfalto estis farita el 450 000 recikligitaj plastaj boteloj kaj 150 tunoj da recikligita asfalto.

La arboj de tiu strato ricevas pli ol 200 000 litroj da ŝtormakvo per sistemo nomata Tree Inlet (enfluejo ĉe la vojrand

kaj akvorezervujo sub la surfaco) kaj forigon de poluaĵoj.

Tiu estas iom seka burokrata lingvaĵo, sed ĝi indikas grandan progreson en la pensado de burokratoj, kies rolo estos ŝlosila, se ni celas savi nian vivejon. La intenco estis montri, ke tiuj ĉi novspecaj manieroj nun jam estas en la merkato kaj povas esti uzataj ie ajn. Apartan signifon al la farita laboro donis la fakto, ke ĝi okazis en la Internacia Tago de la Tero (la 22-an de aprilo). Tute taŭga maniero por celebri!

Aŭstralia/Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro • 6–15 januaro 2023

International House

(Melbourne University, 241 Royal Parade, Parkville, Vic, Aŭstralio)

- Klasoj de Esperanto je du niveloj
- Teatro kaj muziko
- Bankedo
- Ekskursoj
- Prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj
- Babilado, ridado
- Jarkunveno

Pli la informo, inkluzive de prezoj:
esperanto.org.au/kongreso



*Speciala
gasto,
Katalin
KOVÁTS*

Nia speciala gasto

Katalin KOVÁTS estas hungara esperantisto, metodologo, pedagogo, lingvisto, esperantologo, trejnisto, matematikisto kaj vitartisto, loĝanta en Nederlando. Ŝi havis postenon en la hungara universitatranga katedro de aplikata lingvistiko. Krom doni teoriajn lekciojn, ŝi ankaŭ trejnis lingvoinstruistojn pri metodologio. Siajn spertojn ŝi aktive uzas en la plibonigo de la Esperanto-instruado.

Ŝi estas kunlaboranto de la gazeto *Monato* ekde 1994 kaj estis vicredaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) de 1994 ĝis 2006. En 2009 ŝi fondis la reportalon edukado.net, kaj daŭre redaktas ĝin. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto kaj estro de la ekzamenkomisiono de UEA.

Katalin estos la instruisto de la progresintoj kaj ankaŭ prezentos diversajn prelegojn.

Magelano

TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Antaŭ kvincent jaroj (1522) hispana ŝipo *Viktoría* revenis al Hispanujo post trijara ĉirkaŭnavigado de la terĝlobo. Mankas al la ŝipo la estro de la ŝiparo Sinjoro Fernando Magelano. Ankaŭ mankis multaj el la ŝiparanoj kiuj forveturis en 1519. El 270 sur kvin ŝipoj, nur 18 revenis sur nur unu ŝipo. Kvankam Magelano ne vojaĝis al la fino, multaj meritigas lin kiel la unua, kiu ĉirkaŭnavigis la mondon, ĉar li estis en Malukoj ok jarojn antaŭe. En 1521 li atingis Filipinojn, ne tre for de Malukoj, irante okcidenten de Hispanujo. Sed, se vi demandus al hispano, kiu estas la unua, kiu ĉirkaŭnavigis la mondon tiu respondus "Sinjoro Elcarño", la ŝipestro de la reveninta ŝipo.

Kvankam la ŝiparanoj estis plejparte hispanaj, estis multaj el diversaj landoj:

Francujo, Italujo, Grekujo, Portugalujo kaj aliaj. Magelano mem naskiĝis en Portugalujo en 1480. Kiel junulo (ekde 12 jaraĝa), li servis en la palaco de la reĝido en Lisbono. Tiel li edukiĝis kaj lernis pri navigado inter aliaj lertaĵoj. En 1505 li iris kun ŝiparo al Hindujo por servi en la armeo. En 1509 la portugala mararmeo venkis en la batalo de Dui. Tio rompis la regon de la spicmerkato de la arabaj kaj orientaj landoj. Portugalujo iĝis tre potenca lando pro sia rego de tiu merkato inter Azio en Eŭropo.

En 1511 Magelano helpis en la konkerado de Malukoj. Li servis kun Serrão, kiu poste edziĝis kaj loĝis en Malukoj, la tiel nomataj spicinsuloj. Serrão korespondis kun Magelano pri la riĉeco de tiu regiono.



Atlaso Vallard

Magelano ne estis diplomato. Li estis obstinulo, kiu "ne suferus idiotojn", eĉ se tiu estus gravulo. Post sia reveno al Portugalujo en 1513, li servis kiel soldato en Moroko, kie li vundiĝis kaj lia ĉevalo estis mortigita. Li postulis, ke li ricevu monon pro tia perdo. Li ankaŭ komercis kun la lokanoj en Moroko por helpi kontraŭ la malamikoj, kaj estis akuzata pro tio. Ree en Portugalujo, li ne plu ricevis ofertojn pri dungado. Li ripete petis la Reĝon Manuelo arigi ŝiparojn por ekspedicio al la spicinsuloj, sed vane. Fine, en 1517, li forlasis Portugalujon por servi Hispanujon kaj ties junan Reĝon Karlo. En Sevilo, Hispanujo, li edziĝis kun Beatriz Barbosa, filino de samlandano. Per konatoj de la bopatro, Magelano sukcesis konvinki la reĝon kaj la navigadestrojn subteni vojaĝon al Malukoj sed ĉifoje irante okcidenten.

Pro la traktato de Tordesillas (1494), Hispanujo fakte ne rajtis iri orienten ĉar tien estis la tereno portugala. La traktato dividis la mondon en du hemisferojn. La orienta por Portugalujo kaj la okcidenta por Hispanujo. Hispanoj nur rajtis iri rekte okcidenten ĝis ili atingis sian terenon. Portugalujo forte kaj sekrete gardis sian hemisferon kontraŭ ties plej grava konkuranto (ĉu malamiko?), Hispanujo. Kiam reĝo Manuelo eksciis, ke Magelano ofertis sin por servi al Hispanujo, li tre ĉagreniĝis. Li timis ke Magelano malkaŝus ŝtatskretojn pri navigado kaj tiel forrabus merkatojn en la spicinsuloj. La familian domegon de Magelano en Portugalujo oni vandalis, kaj familianoj forfuĝis. Ankoraŭ Magelano preparis por la vojaĝo subtenata de Hispanujo.

Kvankam tia granda rivalado ekzistis inter Hispanujo kaj Portugalujo, la reĝaj



Mapoj de Atlaso Vallard, turnitaj, kun kelkaj modernaj (Esperantaj) loknomoj

familioj intime interrilatis. Je la reveno de la ŝipo *Viktoria* en 1522, reĝis en Portugalujo Johano la 3-a kaj Katarino (geedzoj kaj gekuzoj), kaj en Hispanujo, Karlo la 1-a kaj Izabelo (geedzoj kaj gekuzoj). Johano estas la frato de Izabelo kaj Karlo, la frato de Katarino. Do ĉiuj bogefratoj. Ĉiuj havis la samajn geavojn – Ferdinando kaj Izabelo, kiuj antaŭe reĝis en Hispanujo kaj subtenis la vojaĝon de Kristoforo Kolumbo al la “Nova Mondo”.

Sed eble profito pli regis la landojn. Dum la plejparto de la 16-a jarcento, Portugalanoj nenion publikigis pri sia esplorado tra la mondo. Ili timis la forprenon de sia profito el la oriento. Kiam ili eksciis, ke Magelano forvojaĝis kun aro de kvin ŝipoj, ili elsendis ŝiparon grandan por gardi sian terenon – iuj al la Kabo Bonespera kaj iuj postĉasantaj Magelanon.

Jam en 1500, Manuelo de Portugalujo elsendis dek tri ŝipojn sub la regado de Cabral. La esplorado iris al la orienta marbordo de Sudameriko, kaj poste iuj al Hindujo. Post la malkovro en Sudameriko, Manuelo elsendis Amerigon Vespucci al Ameriko por esplori cele posedon de landoj tie. Vespucci kun ŝipestro Cohelo esploris la marbordon suden. Luj asertas, ke Vespucci priskribis landon malvarmegan en la fora sudo (52°S). Ĉu vere? Se jes, Magelano jam sciis iom pri la marbordo de Sudameriko. Ĉiuokaze ĉi tiuj ekzemploj de portugala esplorado indikas, ke en tiu epoko ili estis majstroj de la maroj rilate al navigado.

La navigiloj de tiu epoko ne estis precizaj. Irante orienten, la portugaloj ne sciis laŭ longitudo kiom da gradoj ili preterpasis. En la plej orientaj partoj (nuntempa Indonezio), ili havis dubojn pri sia rajto al la regiono. La traktato de Zaragosa en 1529 estis provo certigi tiun rajton. Laŭ tiu traktato,

Portugalujo rajtis al landoj ĝis 19° orienten de Malukoj. (Ĉ 149° orienten de Greenwich). La orienta marbordo de Aŭstralio estis preter la limoj por ili. Sed ĉu ili sciis pri la ekzisto de tiu lando?

Nur tri el la ŝipoj de Magelano transiris la Pacifikan oceanon. Unu ribelis apud Sudameriko kaj reiris al Hispanujo, kaj alia perdiĝis laŭ la marbordo de Sudameriko. Post la mortigo de Magelano en Filipinoj, alia ŝipo estis sinkigita pro kadukiĝo. Ŝipoj *Trinidad* kaj *Viktoria* atingis Malukoj-on kaj ŝarĝiĝis per spicoj. En tiu regiono ili renkontis Pedron de la Rosa, kiu estis ano de ŝiparo portugala. Pedro rakontis ke ili antaŭe serĉis la ŝiparon de Magelano dum pli ol jaro. Post tiam Pedro forlasis sian ŝipon por resti en Malukoj. De Malukoj, *Trinidad*, la pli granda ŝipo, provis reveni al Hispanujo orienten, sed kaptiĝis de la portugaloj. *Viktoria*, sub la estrado de Sebastiono Elcarno, iris orienten kaj finfine atingis Hispanujon.

Tridek jarojn poste (ĉ. 1550) en Francujo, mapoj pridesegnantaj tiun parton de la mondo troviĝis: la atlaso Vallard. La interpreto de landoj sur tiuj mapoj ankoraŭ estas disputata. Historiistoj dependas de dokumentoj por priskribi kion la mapoj reprezentas, kaj nenian dokumenton oni trovis. Mapistoj rigardas la mapojn mem kiel dokumentoj. Lawrence FitzGerald, la ĉefa termezuristo de Aŭstralio inter 1942 kaj 1960, dediĉis multan tempon post sia emeritiĝo al la analizo de tiuj mapoj kaj konvinkiĝis ke iuj temas pri la nordo kaj oriento de Aŭstralio. Do kiu kreis la originalajn mapojn kaj kiam?

Fontoj

- *Over the Edge of the World*, de Lawrence Bergreen
- *Java la Grande*, de Lawrence FitzGerald
- Vikipedio

KONTRIBUU

al

La limdato por la
venonta numero estas la
15a de novembro. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!



ESPERANTO

sub la suda kruco



International House , Melbourne University, kie okazos la venonta Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro, 6–13 januaro 2023 (vidu paĝon 21)

Informo pri fotoj

1: Ĵenja Amis antaŭ Sinagogo Beith Shlomo, dum la ekskurso *Montrealo Juda*. Foto: Jonathan Cooper

4: Krokodilo, Timber Creek. Foto:

Terry Manley

5–9: Universala Kongreso, Montrealo.

Fotoj: Jonathan Cooper, krom *Teatraĵo 1910* (pĝ 9): Ĵenja Amis

10: Katedralo de Montrealo.

Foto: David Ryan

11–13: St John's. Fotoj: David Ryan

14–16: Norda Teritorio. Fotoj:

J Marc Schmidt

17–19: Koloroj. Fotoj: Katja Steele

21: Katalin KOVÁTS. Foto: Katalin Kováts

22: Atlaso Vallard, de Skolo Dieppe.

Foto: berkeley.edu, [senkopirajta commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=17037990](https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=17037990)

23: Turnigita mapo, bazita sur bildo de www.wikiwand.com/en/Beyond_Capricorn per Wikipedia

26: Dimmick Courtyard, International House Melbourne. Foto: en.wikipedia.org/wiki/International_House,_University_of_Melbourne

28: Ilia Dewi kaj Teofilo Jose Maria de Jesus, ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso, Melburno, 2015 – Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:
Terry Manley, Paul Desailly

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



IBradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

